★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Anopluroj (pedikoj) kaj ekzantema tifo

Anopluroj (pedikoj, la subordo Anoplura) estas insektoj el la ordo Phthiraptera. Ili estas adaptitaj al vivo sur korpoj de siaj gastigantoj kaj suĉado de ilia sango. El tri specioj, kiuj parazitas sur homoj, estas la plej danĝera la pediko Pediculus humanus, kiu kaŝe vivas en faldoj de vestaĵoj kaj de tie atakas homojn. Ĝi facile disvastiĝas en lokoj, kie estas multe da homoj kaj malbonaj higienaj kondiĉoj (kazernoj, tranĉeoj, bunkroj, malliberejoj ktp.). En intesto de la pedikoj evoluas la rikecio Rickettsia prowazeki. Dum suĉado de la sango infektita pediko infektigas homon per la rikecioj, kiuj povas kaŭzi ekzanteman tifon (tio ne estas intesta tifo). Plej ofte post la 1-2 semajnoj malsanulo eksuferas de febro kaj tremfebro. Konscio de la malsanulo estas nebuligita, sed iam li havas halucinojn. Ĉefa simptomo estas ekzantemo sur korpo, sed nek sur faco nek sur palmoj. Se oni la malsanon efike ne kuracas, la malsanulo povas morti. Transmitadon de la rikecioj pere de P. humanus pruvis Charles Jules Henri Nicolle kaj inter militkaptitoj detale studis Stanislav Provázek kaj Henrique da Rocha Lima, kiuj ambaŭ infektiĝis kaj mortis. Pro tio oni la kaŭzanton de ekzantema tifo nomigis Rickettsia prowazeki da Rocha Lima, 1916. Dum la dua mondmilito Rudolf Weigl eltrovis la unuan efikan vakcinon kontraŭ ekzantema tifo. Tiel li savis vivojn de miloj da homoj, kiuj ĝustatempe estis vakcinitaj aŭ fabrikante la vakcinon laboris en lia instituto kaj tiel ili evitis transportojn en koncentrejoj. Nuntempe oni kapablas ekzanteman tifon kuraci per antibiotikoj (tetraciklino, kloramfenikolo). Aliaj du pedikaj specoj, kiuj parazitas sur homoj (Pediculus capitis kaj Phthirus pubis), la kaŭzanton de ekzantema tifo ne transmisias.
La prelego estos registrata.
**Prelegonto:** **Oldřich Arnošt Fischer**

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 16an de oktobro 2024 je la 18-a h (la klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- La 7an — 10an de novembro 2024 KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), Žilina
- La 5an — 13an de julio 2025 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (Kaunas, Litovio)
- Kaj precipe ni rekomendas UK 2025, kiu okazos la 19a — 26an de julio 2025 en Brno! Se vi volas feliĉi, ne hezitu aliĝi ĝis fino de novembro, kiam finiĝos la unua, la plej malmulte kosta aliĝperiodo.

★

## Cetera programo en oktobro

La 23-an **Nevidantoj kaj muziko** – Danijela Petrovič (RS), rete per Skajpo
la 30-an **Zdeněk Hršel** – Zuzana Hršelová, Miroslav Malovec, klubejo

## Programo en novembro

la 6-an Ankoraŭ ne agordita, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice, rete per Zoom
la 13-an **Tradukado de la gvidlibro**, klubejo
La 20-an **Verdaĵoj** – Mirka Tomečková, rete per Skajpo
la 27-an **Amuzu, lernu, ridu** – Josef Vojáček, klubejo

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)